# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報


**Okazis**

## Kurso komencita

Post longa tempo, ni, Esperanto-Jokohama komencis Enkondukan Kurson de Esperanto, de la lasta aprilo. S-ro Namba Fumiharu gvidas, kaj nun unu sinjorino lernas; espereble de la fino de junio aldoniĝos alia sinjorino. La metodo estas unu-kontraŭ-unu, en Esperanto-Muzeo Jokohama, kaj oni uzas unu horon semajne por la kurso. La uzita lernomaterialo estas “Esperanto per Ekzercaro por Japanlingvanoj”, por kiu estas materialoj reta kaj papera.

## Vizito hazarda aŭ intencita

Lastatempe, ni en Esperanto-Muzeo Jokohama akceptis kelkajn neesperantistajn gastojn. En la 16a de majo, junulo kaj junulino vespere atingis nian muzeon. Ili vidis nian retejon kaj venis el Gubernio Saitama, 100 km for de ni. En la 17a de majo, junulo vizitis nin; li rigardis la surmuran ŝildon de nia muzeo el la fenestro de la trajno Keikyu, kaj interesite venis. Jam estas pluraj personoj tiaj.

**Okazos**

## La 113a Japana E-Kongreso kaj ĝia Postkongresa Ekskurso

En la 3a kaj 4a de oktobro 2026 okazos en Urbo Ĉiba (Tiba), la 113a Japana Esperanto-Kongreso, unuafoje en tiu urbo. La urbo estas la ĉefurbo de Gubernio Ĉiba (Tiba), kiu situas trans la Tokia Golfo de nia Gubernio.


Post la Kongreso, oni okazigos Postkongresan Ekskurson tra la Gubernio Ĉiba, de la 4a ĝis la 5a de oktobro, kaj ĝi finiĝos en nia urbo Jokohamo, en la vespero. Poste volontuloj kune vespermanĝos en la Ĉina Kvartalo en Jokohamo. Tiun postkongresan aranĝon asistas nia rondo, kiu havas sperton de kongresa ekskurso.

Interesatoj demandu nin pri la detalo.

**sezonvorto junia**

## Hortensio アジサイ

**Okita Kazumi**



Dum la pluvsezono ĝi florigas okulfrapajn florojn.
Ĉar la koloro de la floroj iom post iom ŝanĝiĝas, ĝi ankaŭ estas nomata “sepŝanĝiĝulo”.

Tra la tuta Japanio ekzistas “hortensiaj temploj”, kies terenoj estas abunde plantitaj per hortensioj, kaj dum la plej bela sezono de la pluvtempo ili vigle allogas multajn vizitantojn.

En la gubernio Kanagawa famas interalie Meigetsu-in en Kamakura.


Esperanto Jokohama

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)


# EL NIA MUZEO


## "Literatura Mondo" plene represita

En Hungario, de 1922 ĝis 1948 intermite estis eldonita A4-formata gazeto « Literatura Mondo ». La tuta kolekto estis represita en Japanio de 1974 ĝis 1976, en 6 volumoj, tole binditaj, kun indekso. Nia Esperanto-Muzeo posedas plurajn kompletojn dank' al oferado de veteranaj samideanoj.

La maldekstra foto montras la represon de la origina kovrilo, kaj la dekstra foto montras tolan kovrilon de la represaĵo.

En tiu ĉi numero, ni replenas de ili fragmentojn : Proverboj Mongolaj.




# MONGOLAJ PROVERBOJ

Esperantigis : Junŝebu

★ Unu homo ne estas homo, unu fajrero ne estas fajro.
★ Ne demetu la botojn ne vidante la akvon.
★ Ne ornamu vin per ornamaĵoj, sed per scioj.
★ La plej bona riĉo estas la scio, la meza estas la parencaro,
la plej malbona estas la brutaro.
★ Ne diru — la monto estas nepasebla, sed diru — ni pasos, kaj vi pasos.
★ Prefere rompu vian oston ol vian nomon.
★ Ne riproĉu, ke la venena serpento estas malgranda.
★ Rapidu lerni, eĉ se vi mortos morgaŭ matene.
★ La infano, kiu falis mem, ne ploras.
★ Malsukcesa princo havas malsaĝajn subulojn.
★ Formanĝi aŭ ne — la lupo estas ĉiam kulpa.
★ Panon peti de mortinta ruso.
★ La vivo estas kandelflamo en vento.
★ Milmejla vojo komenciĝas per unu paŝo.
★ Ne montru la fumon el naztruoj, eĉ se fajrego brulas en via brusto.

(El la jaro 1933, p.101)